Ni dankas ankaŭ la ĝisnunajn subtenantojn kaj tradukantojn de

manĝokartoj. Baldaŭ sekvos novaj manĝokartoj.

Pluaj objektoj en Esperanto-modelurbo dependas ankaŭ de viaj ideoj, praktikaj subtenoj kaj financado. Bonvolu rigardi la novajn fotojn ekz. de la Esperanto-objektoj sub 'fotoalbumo' en nia retpaĝaro [ic-herzberg.de](http://ic-herzberg.de).

Anticipan dankon kaj bonvenon!

Petro Zilvar, Marika Frense, Zsafia Korody kaj la ICH-teamo  
Germana Esperanto-Centro /  
Interkultura Centro Herzberg,  
Grubenhagenstr. 6, D-37412  
Herzberg/Harz – la Esperanto-  
urbo. Tel. +49/(0)5521-5983  
<http://www.herzberg.de>  
<http://ic-herzberg.de>

kongresa ekskurso ĝis la 8-a. Se vi deziras partopreni kaj viziti Portonovon en Benino, okcidenta Afriko, kontaktu tuj la organizantojn ĉe [www.ilei.info](http://www.ilei.info).

#### • La Ministro de Edukado de Gvineo pretas antaŭenigi Esperanton post interparolo kun la Afrika Komisiono

Delegitaro, konsistanta el la komisiito pri eksteraj rilatoj de la Afrika Komisiono de UEA kune kun loka esperantisto, vizitis la Ministron de Nacia Edukado kaj Scienca Esplorado en Konakrio kaj interparolis kun li pri instruado de Esperanto en tiu lando. Post la reveno la Ministro, s-ro Elhadj Oumane Souare, skribis i.a. (france): "Mi restas je via kompleta dispono por la antaŭenigo de Esperanto en Gvineo ĝenerale kaj aparte en la eduka sistemo."

• **Wikipedio havas jam pli ol 90 mil artikolojn en Esperanto**  
La Esperantlingva versio de Wikipedia (Wikipedio: <http://eo.wikipedia.org/>) jam la 19an de oktobro 2007 transpasis la nombron de 90 000 artikoloj (precize 90 025). Bedaŭrinde ĝi perdis la 15-an lokon inter pli ol 250 lingvoj pro pli rapida kresko de la turka, parolata de inter 65 kaj 73 milionoj da homoj. Pro tio la Esperanta versio bezonas pliajn kompetentajn kunlaborantojn. Utilas ankaŭ kunlabori pri Esperanto en la nacilingvaj versioj, ekz. per traduko de partoj

*Daŭrigo sur paĝo 10*

## MALLONGE

## IN SHORT

#### • En radio kaj televido – prepare por la venontjara UK en Bjalistoko

En la jaro 2009 okazos la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko, Pollando – la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof. Radio Pollando jam nun deziras komenci elsendi programojn en Esperanto per la interreta televido ITVC. La celo estas transdoni gravajn informojn por esperantistoj ne nur el Bjalistoko, sed ankaŭ el aliaj mondopartoj. Radio Pollando elsendos programojn pri esperantistoj, iliaj sukcesoj, kluba agado, kongresoj, renkontoj ktp. Ili prezentos la plej interesajn libroeldonaĵojn, Esperanto-teatrojn, muzikajn ensemblojn, filmojn kaj vizitindajn lokojn. Tial ili petas vin helpi realigi ĉi tiun entreprenon. Bonvolu sendi mallongajn filmajn raportojn, novajn eldonaĵojn kaj muzikaĵojn, kiuj povas esti senpage prezentitaj en la interreta televido.

La materialojn oni povas sendi per interreto al la adreso de la televido: [redakcja@itvc.pl](mailto:redakcja@itvc.pl) aŭ perpoŝte al la adreso: Białostockie Towarzystwo Esperantystów, Bjalistoka Esperanto-Societo, PL-15-282

Białystok, ul. Piękna 3, Skr. pocz. 67, Pollando.

#### • Brita premiito

Ĉe la Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo gajnis la unuan premion en la Oratora Konkurso Rolf Fantom. Gratulon al li!

#### • Esperanto-instruistoj kongresos en Afriko

ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kongresos la unuan fojon en Afriko de la 29-a ĝis la 5-a de aŭgusto 2008. Tio estos granda okazaĵo kaj por la afrika movado kaj por la internacia. Okazos ankaŭ post-

Por festi la 100-jaran jubileon de la fondo de UEA, la venonta *Universala Kongreso de Esperanto* okazos en

## **Roterdamo** **19–26 julio 2008**



– tiel proksime, ke ĉiu brita esperantisto povos partopreni. Nepre kuraĝigu ĉiun spertulon kaj ĉiun lernanton partopreni en la plej granda kaj nemalhavebla Esperanto-evento de la jaro.

• Petu ekzempleron de la 'Unua Bulteno' kaj aliĝilon de EAB, kien eblas ankaŭ pagi, aŭ aliĝu rete ĉe [www.uea.org](http://www.uea.org). Ĉiu individua membro de UEA ricevas rabaton je la kotizo.

el la portalo [http://eo.wikipedia.org/wiki/Portalo: Esperanto](http://eo.wikipedia.org/wiki/Portalo:_Esperanto) <http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto>.

#### • Talent for publicity

Michael Cayley from Hayling Island clearly has a welcome talent for getting in the local press. On 20 August there appeared a substantial article in *The News* on his winning of second prize for poetry at the *Belartaj Konkursoj* at the World Esperanto Congress in Yokohama. The article also featured his novel *Kleriko Malaperas*, which also exists in English, as

*Disappearance of a Priest*. For details contact Michael at [mfcayley@btinternet.com](mailto:mfcayley@btinternet.com).

#### • Practical Wireless

It was recorded in a history note in the October issue of *Practical Wireless* that in 1924 the American Amateur Radio League decided to adopt Esperanto for international communication.

#### • Festi en suda Francio – kun senpaga aliĝo

Post la sukcesa memorfestado de la unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Mar, la plej diversaj francaj asocioj de Esperanto

decidis renkontiĝi ĉiun trian jaron kaj la jaro 2008 kunvenigos ilin en ĉarma haveno, okcidente de Marsejlo ĉe Mediteraneo, Martigues [Martig] de la 21-a ĝis la 25-a de marto. Bunta programo atendas vin: globluda konkurso, Lingvo-Festivalo, prelegoj pri la plej diversaj temoj, koncertoj, ekspozicioj, kaj evidente debatoj kaj rondaj tabloj, se ne paroli pri la kongresoj de Esperanto-France, SAT-Amikaro, junuloj, instruistoj, laboristoj, katolikoj. Senpaga aliĝo por eksterlandanoj. Informoj troviĝas ĉe la retpaĝaro <http://esperantomartigues2008.unblog.fr>; retadreso: [mcerisay@gmail.fr](mailto:mcerisay@gmail.fr) aŭ s-ino Renée Triolle, 694 chemin de la Civade Verte, F-13600 La Ciotat.

#### • Publicity

A mention of Esperanto appeared in *The Guardian* on 19 October (see [www.guardian.co.uk/eu/story/0,,2194680,0.html](http://www.guardian.co.uk/eu/story/0,,2194680,0.html)), and an article appeared in the *North West Evening Mail* (see [www.nwemail.co.uk/news/viewarticle.aspx?id=554110](http://www.nwemail.co.uk/news/viewarticle.aspx?id=554110)).

#### • Disertacio pri esperantologio en Universitato de Parizo

La 6-an de decembro en Universitato Paris VIII, Isabelle Nicolas defendis disertacion pri 'De nova esperantologio tra historioj de vivo: de asocia instituciigo ĝis akademia instituciigo dank' al la aranĝo de memmastrumado kaj teknikoj Freinet'. Célestin Freinet estis elstara franca pedagogo-esperantisto, en kies pedagogia filozofio Esperanto ludis centran rolon. (Pri pedagogio Freinet, vidu ĉe : [http://eo.wikipedia.org/wiki/Célestin\\_Freinet](http://eo.wikipedia.org/wiki/Célestin_Freinet).)

#### • Kion vi opinias pri la lingvoj en Eŭropo?

Nova franclingva dokumento aperas ĉe [www.esperanto-sat.info/article1055](http://www.esperanto-sat.info/article1055) sub la rubriko

*Daŭrigo sur paĝo 13*

## Ligu vin kun la mondo Esperanta!

### Ne forgesu aliĝi al UEA por la Nova Jaro!

#### • Vi povas pagi membrokotizojn por EAB kaj UEA kune

##### Kelkaj kotizoj de UEA por 2008

MG/Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado .....	£6
MJ(-T*)/Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO* (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kun la revuo <i>Kontakto</i> sen plia abonpago) .....	£16
MA(-T*)/Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo <i>Esperanto</i> .....	£39
SZ/Societo Zamenhof: mecenata kategorio, kiu ne inkluzivas membrecon .....	£78

**Pagu al la Brita Peranto:** EAB, Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887. Pagiloj estu skribitaj al 'EAB' (ne al UEA).



#### Kongres-aliĝoj kaj aliaj pagoj

La Peranto povas akcepti pagojn (kvankam ne per kreditkarto) ankaŭ por la Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj la Libro servo de UEA, por kiuj celoj la administrejo de UEA eventuale malfermos por vi personan konton ĉe la Centra Oficejo (CO) en Nederlando. Bonvolu noti, ke la kongresajn kotizojn oni ne fiksas en pundoj, do ilia valoro varias laŭ la taga kurzo. Estas plej avantaĝe aliĝi antaŭ la antaŭa jarfino. La Peranto kutime disponas pri kongresaj aliĝiloj kaj la Unua Bulteno de la UK, sed ne pri librokatalogoj.

#### ☆ Universala Esperanto-Asocio

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando  
Tel. 00-31-10-436-1044; [www.uea.org](http://www.uea.org)

# KLAŬDIA

Aŭtorino: Sonny Álvarez (KUBO)  
Tradukis: José de J. Campos Pacheco (KUBO)



• *EAB Update* has begun co-operation with the quarterly magazine *Juna Amiko* from Hungary, published by Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) and aimed at young people and beginners. It is intended to reproduce a piece from *Juna Amiko* in each issue, as it has long been felt that our beginners and 'progresantoj' are not catered for. If you would like to subscribe to *Juna Amiko*, send just £10 to the EAB office with your name and address, or order on-line (see page 2).

# This quarter's special book offers

• Order on-line at <http://www.esperanto-gb.org/eab/bookcat.htm> or by sending a cheque, made payable to 'EAB' (address on page 2).


**Germanaj biero kaj bierkulturo** Harald Schicke  
£8.80 + 1.32 p&p = £10.12  
Scheessel: MZ-Verlag, 2006 (2nd ed.) 119p,  
22cm, HB, colour-illustrated.

Beer is an important beverage in Germany, with over 5,000 brands. There are also accompanying special glasses, trays and beer-mats. This is a handbook on the subject, presenting an overview of a cultural phenomenon.

**La mastro de l' ringoj** J.R.R. Tolkien £47.50  
+ 7.12 p&p = £54.62 (NB. Special price due to bulk purchase)

Kaliningrad: Sezonoj, 1997 (2nd ed.) 543 + 429 + 399p, 21cm, SB.

William Auld's highly acclaimed translation of *The Lord of the Rings*. This three-volume set



comprises *La kunularo de l' ringo*, *La du turegoj* and *La reveno de la reĝo*. Soft back, coloured cover.

**Beletra Almanako 1** £7.50 + 1.50 p&p = £9.00  
(NB. Special introductory price. See back page of previous issue of *EAB Update* for further details.)

Editors: J. Camacho, P. Dasgupta, I. Ertl. New York: Mondial, 2007. 176p, 21cm.

Original and translated prose, poetry, essays and reviews. Includes works awarded prizes in the UEA 'Belartaj Konkursoj'.

**Mi estas homo** L.L. Zamenhof £16.35 + 2.45 p&p = £18.80

Kaliningrad: Sezonoj, 2006. 287p, 20cm.

A total of 76 original texts and an interview, presenting a picture of Zamenhof's view of the world. Compiled and edited by Aleksander Korĵenkov.

**Biblio.** Editors IKUE and KELI £14.69 + 2.20 p&p = £16.89

Dobřichovice: Kava-Pech, 2006. 1,375 paĝoj, 21cm, HB.

Contains the Old Testament, the New Testament and the deuterocanonical (second canon) books. Translators include Zamenhof, Berveling, Rust, Beveridge, Wilkinson.



'Et vous, que pensez-vous des langues en Europe?' (Kaj vi, kion vi opinias pri la lingvoj en Eŭropo?). Temas pri respondo, subskribita de s-ro Negravaski, al demando de Leonard Orban, membro de la Eŭropa Komisiono pri Multlingveco. Eblas respondi al lia demando en ĉiuj lingvoj de EU ĉe <http://forums.ec.europa.eu/multilingualism/>.

• **English: 'The Killer Language? Or a Passing Phase?'**

Leading American linguist Prof. Joshua A. Fishman provides an interesting analysis of the 'killer language' under this title at <http://www.wholeearthmag.com/ArticleBin/328.html>.

• **Turismi en Strasburgo per Esperanto**

Ĉiujare enboatiĝas en la Strasburga Sendependa Haveno 500 000 turistoj. Pro tio oni proponis al la haveno traduki la informojn pri promenado tra la urbocentro kaj la eŭropa kvartalo en Esperanton.

Eblas elŭti la sondosierojn kaj aŭskulti ilin per mp3-ilo. Vidu ĉe <http://www.esperanto-strasbourg.net> <<http://www.esperanto-strasbourg.net>> aŭ <http://benecyril.free.fr>.

Lokaj Esperanto-klubanoj nun planas organizi inaŭguron de tiu nova uzebleco de Esperanto, venigante gravulojn, kiel ekzemple Eŭropajn Parlamentanojn. Ili cetere celas filmi inaŭguran paroladon, aldoni bildojn de la urbo, kaj disvastigi ilin senpage al ĉiuj televidkanaloj en Eŭropo, kiuj dezirus raporti pri la evento. Informis Cyrille Hurstel el Esperanto-Strasbourg.

• **Anglalingvaj argumentoj petataj ĉe franclingva retpaĝo**

'Amuza' franclingva retpaĝo 'Défendons l'anglais !' (Ni defendu la anglan! [http://www.agoravox.fr/article.php3?id\\_article=29606](http://www.agoravox.fr/article.php3?id_article=29606)) atakas Esperanton. Francaj esperantistoj

petas kompetentajn respondojn favorajn al Esperanto en la angla lingvo. Necesas enskribiĝi por voĉdoni ('simpla afero').

• **Franclingvaj filmetoj kondukas al solvo**

Serio de dek 10-minutaj franclingvaj filmetoj pri lingvoj, en kiuj Claude Piron laŭgrade kondukas al la solvo 'Esperanto', estas troveblaj en Youtube.

Sufiĉas tajpi 'Youtube + Claude Piron' por atingi ilin. Aŭ oni povas iri al [www.youtube.com/dannirlsne](http://www.youtube.com/dannirlsne) kaj alklaki sur la cifero interparenteza post 'Videos'.

La titolo de la serio estas 'Les langues : un défi' (La lingvoj: defio), kaj la dek programoj estas:

1. Se comprendre (Interkompreniĝi)
2. La diversité des langues (Lingva diverseco)
3. Le handicap linguistique (Lingva handicap)
4. Les instances internationales (Internaciaj institucioj)
5. Passer d'une langue à l'autre (Transiri de lingvo al alia)
6. Les langues, ça coûte (Lingvoj, tio kostas)
7. La peur du réel (La timo al la realo)
8. Le fonctionnement du cerveau (Funkciado de la cerbo)
9. Programmation génétique (Genetika programado)

10. La solution (La solvo).

Claude Piron mem skribas: 'Estante nek juna nek bela, kaj ne sentanta min hejme antaŭ kamero, mi estis skeptika pri la afero, sed mi ricevas mesaĝojn de homoj, kiuj dankas kaj gratulas. Ŝajnas do ke estas ia efiko. Bonvolu indulgi mian tendencon uzi iun ajn pretekston por reklami pri mi.'

• **Oficiale informiĝi Esperante pri laborado en Aŭstrio**

La Aŭstria Federacia Ministerio por Ekonomio kaj Laboro, Sekcio por Laborjuro kaj Laborinspektado, Vieno, daŭrigas informadon en Esperanto. Temas pri po du paĝoj pri 'La laborloka taksado' (ĉe [www.arbeitsinspektion.gv.at/NR/rdonlyres/F3D61CAD-33D6-48DE-9EDD-98FF3EBC606](http://www.arbeitsinspektion.gv.at/NR/rdonlyres/F3D61CAD-33D6-48DE-9EDD-98FF3EBC606)) kaj 'Maŝinoj, laboriloj' ĉe [www.arbeitsinspektion.gv.at/NR/rdonlyres/08B688F9-5221-4228-96FD-FB1B6286B1A](http://www.arbeitsinspektion.gv.at/NR/rdonlyres/08B688F9-5221-4228-96FD-FB1B6286B1A). Informis Leopold Patek.

• **Konkurso por EU-funkciuloj prokrastita pro lingva kaoso**

Laŭ informo de Joëlle Cunnac, konkurso por EU-funkciuloj estis prokrastita pro tio, ke oni anoncis ĝin nur trilingve (angle, france, germane) [Kial ĝuste tiuj tri? Ne estos premio por la ĝusta respondo!] ... kaj la temo de la konkurso estis 'Pri lingva egaleco



**Dante je speciala rabato**

Napola Esperanto-Asocio, Italio, ofertas rabatite ĝis la 28-a de februaro sian eldonaĵon *Danteskaj itineroj* de prof. Vittorio Russo en la esperantigo de la konata Esperanta verkisto Nicolino Rossi, kun versaj tradukoj de E. Dondi kaj K. Kalocsay. Temas pri du emocivekaj kaj atentokaptaj vojaĝoj tra la vivo kaj la verkoj de la itala ĉefpoeto Dante Alighieri.

Por mendoj ricevitaj ĝis februaro 2008 vi pagos nur € 6,50 plus sendokostoj de 2,00 = € 8,50. Mendu ĉe: Napola Esperanto-Asocio (NEA), Via Pietro Castellino 115, IT-80131 Napoli; rete: [nicolino.rossi@esperantanapolo.info](mailto:nicolino.rossi@esperantanapolo.info). Eblas pagi aŭ rekte al NEA aŭ al ilia konto ĉe UEA: [npea-c](mailto:npea-c).

aŭ demokrateco en EU! Vidu ĉe <http://www.cafebabel.com/fr/article.asp?T=T&Id=12740>. Laŭ sperta gvidanto de la Komisiono: *Le problème est que les retards chez nous sont dus à une administration chaotique et à une mauvaise gestion des traductions, phénomène aggravé au cours des dernières années par l'entrée de douze nouveaux pays dans l'UE.* ('La problemo estas ke la malfruoj ĉe ni ŝuldiĝas al kaosa administrado kaj malbona mastrumado de la tradukoj, fenomeno pligravigita dum la lastaj jaroj pro la eniro de dek du novaj landoj en EU.')

• **Irana premio por Esperanto**  
La 7-an de septembro la ĵurnalo *Gham-e-Gha'm* (n-ro 2157) raportis pri grava lingva festivalo, en kiu partoprenis multaj homoj, inkluzive de la vicprezidanto de Irano kaj ĉefo de la Nacia Biblioteko. Temas pri festivalo de 90 lingvoj, el kiuj fine kvin lingvoj ricevis apartan premion pro la alloga maniero, en kiu oni prezentis ilin kaj la nombro da allogitoj. Inter tiuj lingvoj estis Esperanto. Pliaj informoj ĉe: [www.jamejamonline.ir/jamejam.asp?t=cul](http://www.jamejamonline.ir/jamejam.asp?t=cul).

• **Spegulo – nova revuo**  
Laŭ la anoncoj, *Spegulo* estos kvaronjara revuo kun socikultura enhavo. Kun 64-paĝoj en la formato A5, la unua numero aperos meze de marto 2008. Ĝin redaktos la pola kvaropo: Tomasz Chmielik, Kazimierz Leja, Lidia Ligęza kaj Stanisław Śmigielski. '*Spegulo* turnas sin al leganto aktiva, lingve matura,

### *Korespondi kaj kolekti*

- Mi ŝatas literaturon, lingvojn, vojaĝojn. Mi havas 73 jarojn kaj deziras korespondi per-letere kun personoj el Eŭropo. **Branka Leontiĉ**, Trg Djackog Bataljona, 3/I-8, CS-15000 Sabac, Serbio.
- Por mia kolekto mi serĉas malnovajn esperantajojn, precipe britajn Esperanto-stampojn, interŝanĝe aŭ aĉete. **Stanisław Rynduch**, Auerbacher Str. 2d, DE-08223 Falkenstein, Germanio; rete: [amlaskowska@interia.pl](mailto:amlaskowska@interia.pl).

kritike sekvanta okazantaĵojn en la moderna kulturo, eŭropa kaj monda. Per *Spegulo* ni intencas konvinki esperantistojn, ke la Zamenhofan lingvon ili lernas kaj praktikas ne nur por kongresumi kaj plum-amikadi, sed ankaŭ por vastigi siajn penshorizontojn.'

Jarabono por eksterlandanoj: 18 eŭroj (+ 6 eŭroj por eventuala prioritata ekspedado). Abonojn akceptas: Wydawnictwo HEJME PL 41-250 Czeladz, ul. Wąska 21 mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644 BIC/SWIFT: BREXPLPWMBK.

• **Article in *New English Review***  
An interesting presentation of Esperanto appeared in the *New English Review* in December 2007, by Norman Berdichevsky.

• **'Miro' por komputiloj, grandparte regebla en Esperanto**  
'Miro' estas nova libera programo uzebla por komputiloj PC, Mac kaj Linukso. Ĝi ebligas spektadon de videoj per komputilo kaj interretan enŝutadon aŭtomatan aŭ ne. Laŭ la informoj, ĝi ekzistas nur en la angla.

'Kvankam tio ne tro plaĉis al mi, mi tamen faris serĉadon por enŝuti ĝin. Post ekstarto kaj unua klavfrapo, mi tuj konstatis kun duobla miro aperon de la vorto

### *Membership News*

#### **New Members**

D. Brooks, Lincoln  
S. Engledow, Norwich  
Luiz Grasso, Surrey  
K.J. Smith, Fleet

#### **Completed the Free Postal Course**

M.F. Ablett, Danbury  
C. Wightwick, London

#### **Elementary Exam**

Adam King, Stalybridge (Merit)

#### **Deceased**

Richard Davies, Norwich

'sekva'... kio ne aspektis al mi tre anglalingva. Pligrandiĝis mia jam duobla miro, kiam mi vidis, iom pli supre, bonan frazon en Esperanto ... Nu, efektive, tiu programo estas grandparte legebla kaj regebla en Esperanto. Aperas bonorde, kun la supersignoj, la titolo 'Videoserĉo'. Sur la linio, per kiu la programo estas regebla aperas 'Miro', 'Dosiero', 'Redakti', 'Kanalaj', 'Listo de muzikpecoj', 'Fenestro', 'Helpejo'. Tamen, kiam oni disvolvas tiujn menuojn, granda parto el la indikoj aperas nur angle, precipe sub 'Helpejo'. Gratulindas la kreintoj kaj tradukintoj de tiu programo, antaŭe nomita 'Democracy Player', kaj tiuj, kiuj havis la ideon nomi ĝin (ĉu ne intence?) per Esperanta vorto. (Informis Henri Masson).

#### • **Memore al esperantistoj-viktimoj de diktaturo**

'Memore al pacaj esperantistoj, viktimoj de la diktaturo': <http://www.homadigno.net>. □

### **Incorporating the Trustees as a body**

The trustees applied to the Charity Commission for incorporation of the trustees as a body, which was granted on 5 October 2007.

This will avoid the need to change signatures on contracts when trustees retire or are newly appointed. No changes to the Constitution were necessary.

[Legislation has not yet been passed to establish *Charitable Incorporated Organisations (CIOs)* which will be similar to a Limited Company.]

JMB

# Ekpaku!

☆ Plena listo de aranĝoj estas konsultebla ĉe la retpaĝaro [www.esperanto.hu/kalendar](http://www.esperanto.hu/kalendar) aŭ [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu), aŭ sendu iun ajn retmesaĝon al la aŭtomato: [kalendaro@esperanto.org](mailto:kalendaro@esperanto.org). Se vi deziras rigardi mapon de aranĝoj, iru al: [www.esperantoland.org](http://www.esperantoland.org)

18–20 januaro  
**'Ni Festivalu!'**, Barlastono. Info.: Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent DT12 9DE. Tel. 0845 230 1887; rete: [eab@esperanto-gb.org](mailto:eab@esperanto-gb.org)

1–3 februaro  
**36-a Studsesio por Klerigado** (faka klerigseminario) ĉe Interkultura Centro Herzberg, Germanio. Info.: ICH, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel. +49/(0)5521-5983; rete: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

2–8 februaro  
**Interlingvistikaj Studoj** ĉe la Universitato Adam Michkiewicz, Poznań, Pollando. Info.: D-rino Ilona Koutny, Universitato Adam Miczkiewicz, al. Niepodleglosci 4, PL-61-871 Poznań.

8–10 februaro  
**Esperanto-lingvokursoj** por komencantoj ĝis parolantoj, Interkultura Centro Herzberg, Germanio; plilongigeblaj (11–15 feb.) kun vintroport- kaj ekskurseblecoj, vizitoj al muzeoj, naĝejoj, saŭnoj, uzado de la biblioteko kaj vidbendservo. Info.: vidu supre.

11–15 februaro  
**5-a Azia Kongreso de Esperanto**, Bengaluro, Barato (Hindio). Info.: D-ro P.V. Ranganayakulu – rete: [ranganayakulu@gmail.com](mailto:ranganayakulu@gmail.com)

21 februaro  
**'Internacia Tago de la Gepatra Lingvo' de Unesko**

1–8 marto  
**Mediterranea Esperanto-Semajno**, Francio. Info.: Monique Prezioso, 92 impasse Jean Moulin, FR-83700 Saint-Raphael, Francio. Info.:

Christine Graissaguel. Tel. +33 (0)494 95 66 18, +33(0)494 83 06 88; rete: [prezmoni@hotmail.com](mailto:prezmoni@hotmail.com)

21–25 marto  
**Tutfranca Esperanto-renkonto**, Martigues (okcidente de Marseille) – senpaga aliĝo por eksterlandanoj. Info.: <http://esperantomartigues2008.unblog.fr>; rete: [mcerisay@gmail.fr](mailto:mcerisay@gmail.fr)

4–6 aprilo  
**Faka Klerigseminario**, Interkultura Centro Herzberg, Germanio. Plilongigebla je semajno. Info.: vidu supre.

1–11 majo  
**20-a Esperanto-Festivalo 'Aroma Jalto'**, Ukrainio. Info.: p/k35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio. Tel. +380-44-2851701, (poŝtel.) +380-67-4403172; rete: [volodomir@ukr.net](mailto:volodomir@ukr.net)

1 majo–15 oktobro  
**Someraj Esperanto-Ripozoj ĉe Nigra Maro**, Bulgario. Info.: Burgas, kv. Krajmorie, str. Ĉernomorka 9, Bulgario. Tel. +359-(0)56/89-00-10, GSM 359-(0)877-46-41-88; rete: [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg)

5–9 majo  
**Interkultura Semajno** kun prelegoj pri interkulturaj temoj, diskutoj, muziko, Interkultura Centro Herzberg, Germanio. Info.: v. supre.

9–11 majo  
**89-a Brita Kongreso de Esperanto**, Southport, Britio. Info.: EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887; rete: [eab@esperanto-gb.org](mailto:eab@esperanto-gb.org); [www.esperanto-gb.org](http://www.esperanto-gb.org)

15–18 majo  
**Berlina Arbara Renkontiĝo**, Bad Münden (inter Hannover kaj Hameln), Germanio. Ideala por familioj kun etaj infanoj. Info.: Andi Münchow, Oberstr. 15, DE-30167 Hannover. Rete: [DL8oap@gmx.net](mailto:DL8oap@gmx.net)

29 majo–1 junio  
**Internacia Mara Esperanta Renkontiĝo**, Krajmorie, Bulgario. Temo: 'Originala Esperanto-literaturo', lekcionoj, debatoj, distraj vesperoj, ekskursoj. Info.: rete: [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg)

1–7 junio  
**Internacia Esperanto-Aranĝo 'Turismo, Kulturo, Historio'**, Carevo (ĉe Nigra Maro), Bulgario. 'Plena pensio po 14 eŭroj tage.' Info.: Inĝ. Boris Vasilev Gaĝanov, ul. Petar Janev 21, BG-4600 Velingrad. Tel. 00-35-935954204, (poŝtel.) 00-35-9898676270; rete: [gadzanov\\_b@abv.bg](mailto:gadzanov_b@abv.bg)

6–9 junio  
**103-a Skota Kongreso de Esperanto**, Invershin Hotel, Invershin, Sutherland. Info.: David Hannah, Tigh na Cnoc, Ardgay Hill, Ardgay, Sutherland IV24 3DH. Tel. 01863 766061; rete: [dhannah559@hotmail.co.uk](mailto:dhannah559@hotmail.co.uk)

23–27 junio  
**Esperanto-kursoj**, Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, Finnlando. Ĉiuj kursoniveletoj, kursoj el la tuta mondo. Instruisto Atilio Orellana Rojas; kursogvidanto Tiina Oittinen. Info.: Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki. Rete: [eafsekretario@esperanto.fi](mailto:eafsekretario@esperanto.fi)

3–6 julio  
**67-a Hispana Kongreso de Esperanto**, Cuenca, Hispanio. Rete: [alejandro.pareja@gmail.com](mailto:alejandro.pareja@gmail.com)

10–12 julio  
**Festivalo de Fiŝista Supo**, Baja, Hungario. Popolfesto kaj kuirkonkurso kun esperantista partopreno! Info.: Székely Csaba, rete: [bajai@eposta.hu](mailto:bajai@eposta.hu); tel. +36-30-3032386 aŭ +36-70-3336111

12–18 julio  
**7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto**, Montrealo. Info.: TAKE-ESK, 6358-a rue de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado H2G 2R8; rete: [informo@take7.ca](mailto:informo@take7.ca)

12–18 julio  
**Internacia Esperanto-Konferenco 2008**, Nova Gorica, Slovenio. Temo: 'Fernando de Diego – lia vivo kaj verkoj'. Rete: [eric@laubacher.fr](mailto:eric@laubacher.fr) aŭ [ed.borsboom@versatel.nl](mailto:ed.borsboom@versatel.nl)

13–18 julio  
**16-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso**, Krakovo, Pollando. Rete: [umea@interia.pl](mailto:umea@interia.pl)

19–26 julio  
**93-a Universala Kongreso de Esperanto**, Roterdamo, Nederlando.  
 Info.: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel. +31-(0)10-436-1044; rete: info@uea.org; www.uea.org



26 julio–  
 2 aŭgusto  
**Internacia Junulara Kongreso de TEJO**, Szombathely, Hungario.

Rete: hej@eszperanto.hu

27 julio–3 aŭgusto  
**Kultura Esperanto-Festivalo**, Helsingør, Danlando.  
 Rete: kef9@tejo.org

2–8 aŭgusto  
**Magiverda Internacia Renkontiĝo**, Duga Resa, Kroatio – ‘post IJK amuziĝi en bela verda naturo’. Info.: Kneza Mislava 11/IV, HR-10000 Zagreb, Kroatio; rete: kajulino@gmail.com aŭ tina.tisljar@gmail.com

1–17 aŭgusto  
**Somera Mezeŭropa Renkontiĝo**, Kall-Krekel, Germanio.  
 Info.: EsperantoLand, Lu Wunsch-

Rolshoven, Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin. Rete: somere5@esperantoland.org; tel. +49-30-685 58 31

9–15 aŭgusto  
**Somera Festivalo** – ‘Kunludu kaj kunstudu’, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Britio. Tri-nivela kursaro kun eblo turismi. Info.: EAB, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887; rete: eab@esperanto-gb.org; www.esperanto-gb.org

17 aŭgusto  
**Internacia Esperanta Tablotenis-Konkurso**, Hódmezővásárhely, Hungario. Info.: Katarina Faragó, tel. +36-30-3564202

20–24 aŭgusto  
**Boatado en Hungario** – Internacia boat- kaj remtendaro apud kaj laŭ rivero Tisza. Info.: Vas-Szegedi Julianna, HU-5350 Tiszafüred, Kismuhi utca 5. III/12. Tel. +36-30-2929-331; rete: j1969@vipmail.hu

23–30 aŭgusto  
**EKOTUR 08** – turisma renkontiĝo por piedturistoj kaj biciklantoj apud Karlštejn (proksime al Prago). Info.: Kava-Pech, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio. Tel. +420-257712201, fakso +420-

257712126; rete: chrdle@kava-pech.cz


septembro  
**24-a ‘ARKONES’ – Artaj Konfrontoj en Esperanto**. Manifestacio de Esperanto-Kulturo en Poznań, Pollando. Paralele okazos studsesio pri lingvistiko en Esperanto ĉe Universitato Adam Mickiewicz. Info.: tel. +48-509-400-317; rete: arkones@esenco.org


4–7 septembro  
**Berlina Arbara Renkontiĝo**, Bad Münden, Germanio. Info.: vidu supre.

26–29 septembro  
**Internacia Amikeca Renkontiĝo**, Aylesford, Kent. Info.: Anica Page, 7 Hampton, Great Holm, Milton Keynes MK8 9EP. Tel. 01908 564004; rete: terry-page@supanet.com

novembro  
**1-a Amerika Festivalo de Esperanto**, Havano, Kubo. Info.: Kuba Esperanto-Asocio, Apartado 5120, CU-10500, La Habana. Tel. +53-7-404484; rete: info@esperanto.co.cu

7–9 novembro  
**Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko**, Dobřichovice, Ĉeĥio. Info.: chrdle@kava-pech.cz


Saluton!
Ensaluti | Enskribiĝi serpage | Helpo




### Per ipernity vi povas


- Disponigi viajn fotojn, muzikon kaj filmojn
- Krei vian plurmedian blogon
- Inviti viajn amikojn, vian familion
- Malkovri la reston de la mondo

Mi enskribiĝas!

**Esplori pri ipernity** Blogoj, fotoj, filmoj, sonaĵoj...



**Kiuj jam estas anoj de ipernity?**



📄 Dokumentoj 📝 Blogoj